

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliu-  
uloj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leopold  
Elb.*

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim  
Gießner*

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

Min kaptas malgaj' en  
la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun per-  
sist'.

Aere fridetas, trankvi-  
las,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte bri-  
las  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kom-  
bilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

Ne scias mi, kial mi  
estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia me-  
mor'.

Vespero jam ekmalhe-  
liĝas,  
Fluadas la Rejn' en  
trankvil',  
La supro de l' monto  
lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen  
tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kro-  
nas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el  
oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Malgajon mi sentas en  
koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa  
foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en  
malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en  
orbelo  
pro suna lum' de l' ves-  
per'.

Jen supre kabino pro-  
vokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas  
sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

...

Ignoro, quid id sibi  
velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabel-  
lam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et friges-  
cit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lu-  
cescit,  
Dum Phoebus occi-  
dit.

Sedet in summo  
montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma  
frontis,  
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pec-  
tit,  
Carmen canens pro-  
cul,  
Mirandum id habet  
modum  
Nec non virilem si-  
mul.

...

Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ek- zalt'.	Kaj sopiregon eksen- tas	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'.	In cymba navitam mille
Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.	Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!	Angores feri tenent, Non videt scopulos il- le, Ocli non si sursum vi- dent.

Mi kredas, ke ondoj ti- ras	Mi kredas, ke dronos finfine	Ĝis tiras kun si al Rejn- fundo	Opinor undas de- vorare
la ŝipon funden de l' Rejn';	Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine	la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la pro- fundo	Nautam cum navicu- la,
kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.	La Loreleja kantad'.	pro Loreleja kantad'.	Effecit solo canendo Lurleia id dea.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)